

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2018 Vendredon la 31an de aŭgusto 66a jaro

Kalendaro

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardon la 4an de septembro (semajno 36) *tirsdag*

La Universala Kongreso en Lisbono. *Verdenskongressen i Lisboa.*
Otto Prytz raportos. *Rapport ved Otto Prytz.*

Lundon la 17an de septembro (semajno 38) *mandag*

Somera Esperanto-Studado en *Somera Esperanto-Studado en*
Slovakio. (renkontiĝo por komenc- *Slovakio. (møtested for nybegyn-*
antoj kiuj lernas solaj per la reto (aŭ *nere som lærer alene på internett*
laŭ libro). Raportos Alexander *(eller av en bok). Raportos*
Harestad Kvidbergskår. *Alexander Haretad Kvidbergskår.*

Mardon la 2an de oktobro (semajno 40) *tirsdag*

Studkunveno. Ni pludiskutos *Studiemøte. Vi fortsetter å diskutere et*
malnetan tradukon de broŝuro *utkast til oversettelse av en brosjyre om*
pri malnovaj metioj. *tradisjonelle håndverksyrker.*

Lundon la 15an de oktobro (semajno 42) *mandag*

Kjell Peder Hoff partoprenis ĉi- Kjell Peder Hoff har i sommer vært
somere fervojistan, polan kaj italan med på jernbanefolkets kongress,
jarkongresojn. Li rakontos. dessuten på den polske og den
italienske kongressen. Han forteller.

Mardon la 6an de novembro (semajno 45) *tirsdag*

Nomoj de landoj kaj ĉefurboj en *Navn på verdens land og hoved-*
Esperanto. Otto Prytz klarigas pri *steder. Otto Prytz forklarer*
la principoj kiuj gvidas la *prinsippene bak beslutningene til*
decidojn de la Akademio (kie li *Akademiet, hvor han er medlem.*
membras).

Daŭrigo / forts. nests side ->

[daŭrigo / forts. de la frontpaĝo]

Lundon la 19an de novembro (semajno. 47) *mandag*

Asbjørn Lindh vizitis la Esperanto-klubon de Kathmandu. (Nepal). Li donos siajn impresojn pri la aktivado tie.

Asbjørn Lindh har besøkt Esperantoklubben i Kathmandu (Nepal). Han gir sine inntrykk fra aktiviteten der.

Mardon la 4an de decembro (semajno 49) *tirsdag*

Dua studkunveno. Same kiel 2. okt. *Andre studiemøte. Som 2.okt.*

Lundon la 17an de decembro (semajno 51) *mandag*

Literatura vespero. Ĉiu prezentu iun libron. (Sed bonvenon ankaŭ sen libro)

Litteraturkveld. Alle velger en esperanto-bok og forteller om den (men velkommen også uten bok).

VÅRE MØTER foregår hovedsakelig på esperanto, for vi trenger å praktisere språket. Men vi prøver å ta hensyn til alle deltakernes behov. Vi mottar statsstøtte gjennom Studieforbundet Næring og Samfunn, etter studieplanen "Esperanto konversasjon".

OKAZIS

Biblioteka fiasko (9.3)

La biblioteka informbudo fiaskis – la publiko tre malmultis kaj tute ne interesiĝis. Informilojn lasitajn en alia biblioteko neniu prenis. Pli bone serĉi kaj listigi taŭgajn afiŝtabulojn en butikoj. Sed kiel kontaktiĝi kun la – certe centoj da – lernantoj ĉe *lernu.net* kaj *duoling.com*??

Hereditaj libroj k.a. (3.4)

Ni trarigardis la multajn librojn kaj aliajn heredaĵojn de Pepita. Post ordigado ni devos remeti multajn el la libroj en skatolojn, ĉar ne sufiĉas la liberaj bretoj. La literludon (hejmfaritajn (de Herbert) tabulon

kaj tegetojn) ni zorgo konservos.

Vizto pri E-o en Aŭstralio (9.4)

Kromkunveno pro vizito de Jennifer kaj Alan Bishop. Ili vivis 25 jarojn en Melbourne, Aŭstralio, antaŭ ol reveni lastjare al Anglio. Jennifer raportis pri tri esperigaj aferoj por la aŭstralia E-movado: (1) malferma retejo, kie ĉiuj povas skribi, (2) komuna kongreso kun Nov-Zelando kaj Indonezio kaj (3) ne-Esperanta virtuala renkontiĝejo *Meet up* por trovi samideanojn.

Lertiga tradukkunveno (16.4)

Ni daŭrigis la tradukadon de *Malnovaj metioj*. Tre lertiga diskuto!

Kun danoj kaj svedoj ŝipe (14.5)

Kromkunveno pri la ĵusa skandinava surŝipa renkontiĝo. Cécile Anda (Rogaland) raportis kaj esprimis ĝeneralan kontenton pri la aranĝo, precipe ke ĝi donis okazon (re)konatiĝi kun aliaj e-istoj. Ŝi volus nur havi plian tagon en Kopenhago – kaj maltrafis komunan adiaŭon (ĉu okazis?).

Kun danoj kaj svedoj ... (2)(5.6)

Ni ankoraŭfoje diskutis pri la skandinava surŝipa kongreso, ĉi-foje kun du aliaj partoprenintoj: Pluraj programeroj ne funkciis glate, pro nesufiĉa antaŭplanado. Nur unu nesvedo ĉeestis la svedan jarkunvenon. Eble plej sukcesa estis la neformala interkontakto. Oni decidis ripeti la aranĝon ĉiun trian jaron. NEL devos decidi ĉu aranĝi sian landan kongreson en tia ŝipo.

Pri mitologio (18.6)

Anna Maria amplekse rakontis pri mitologio ĝenerale, kaj precipe el la greka mitologio, kiun oni pli bone konas en Pollando ol ĉi-nordie. Ĉar la mitologiaj rakontoj estiĝis kaj vivas dum longega tempo, ili povas enhavi profundan veron. Nia kulturo heredis el ili ne nur vortojn – tagojn de la semajno, planedoj, elementoj – sed ankaŭ ideojn, kiel narcisismo, tantalo, nemezo, sizifa laboro.

Pri lingvo kaj mondo (9.6)

Anna Maria enkondukis pri la interrilato inter lingvo (leksiko, lingva strukturo) kaj nia percepto de la mondo. Ne ĉiuj lingvoj havas -is/-as/-os; iuj havas ne nur pluralon, sed ankaŭ dualon; iuj ne distingas inter verdo kaj bluo; aŭ ne havas apartajn vortojn por homo kaj viro; aŭ por "li" kaj "ŝi": – sed jes alparolas amikojn per "ci", aliajn per "vi". Neniu du lingvoj same bildigas la mondon.

Informkunveno por *Duolingo*anoj k.a.

Pli ol miliono da homoj tra la mondo registris sin por la angla/hispana Esperanto-kurso ĉe *duolingo.com*, sed en la E-movado ni ĉiuj demandas: Kie ili estas? Ili ne venas al niaj kluboj kaj kongresoj. Nun finfine UEA establis kontakton kaj Duolingo ebligis al lokaj kluboj kaj aliaj aktivuloj anonci al Duolingo-lernantoj pri lokaj aranĝoj. En informkunvenoj ni povas malkaŝi al ili kie trovi aliajn kiuj lernis la lingvon kaj kiel uzi ĝin.

Sabaton 25. aŭgusto grupo de junaj Oslo-klubanoj invitis al informkunveno en Esperantonia. Venis tri novuloj. Estis bona etoso kaj ili aĉetis librojn. Tiuj junuloj disponas limigitajn fortojn kaj tempon, sed planas ripeti la aranĝon post du monatoj kaj intertempe inviti la Duolingo-anojn al neformala kunveno en la urbocentro.

Mela-festivalo: informbudo

Ankaŭ ĉi-jare ni havis informbudon en la Mela-festivalo, en granda tendo (*Infobazar*) sur la urbodoma placo. Helpis deĵori pluraj novuloj kaj venis ankaŭ malnovaj membroj. Ni ne rajtis vendi ion, sed ni disdonis diversajn faldfoliojn, respondis demandojn kaj pruvis al dubantoj nian pluekziston.

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj k.s. donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto – kiel ekzemple en la Mela-festivalo (aŭguste ĉiujare). Ofte jun(et)uloj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni**.

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Eller et lokalbibliotek som er mot-takelig. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Vipps Nun eblas pagi al la klubo, interalie por libroj k.s., per Vipps 533108 (sed membrokotizon pagu al NEL (kiu plusendas 25% al la klubo).)

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen.
Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper

